



FENOMENO DE INTER- NACIA LINGVO EN RIJEKA

ANTAŭ 100 JAROJ



Gazeto de la Komunuma Esperanta – organizajo – Rijeka

Redaktoro: Damir Rak

Lektoro: Anja Hurčak

ADRESO DE LA REDAKCIO: Esperantista societo
"A. Š. Turković"
Korzo narodne revolucije 2a/III
51000 R I J E K A

Telefono: (051) 34-670

Presita en: "Linija", V. Hofbauer, Rijeka

Kunlaboris: Radoslav Škalamera, Barica Grgurević, Anja Hurčak, Slobodan Vitolović,
Boris Di Costanzo, Gordana Dokmanović, Sanja Bokulić, Viktor Hreljanović,
Anemarija Bačić, Srećko Ulrich, Josip Golčić, Zlatko Vukelić, L. Č.

Fotaj de Rijeka: Viktor Hreljanović (el persona kolekto)
kaj Srećko Ulrich (el Muzeo de nacia revolucio, en Rijeka)


ENHAVO:

PAĜO:


1. Fenomeno de internacia lingvo en Rijeka (unua periodo)	1
2. Imena zaslužna za ŝirenĵe ideje o meĉunardnom jeziku na podruĉju Rijeke i ŝire regije	65
3. Poezio de Zlatko Vukelić	66
4. Gdĵe ima esperantista u rijeĉkoj regiji	66
5. Tĵedan esperanta u Rijeci	67
6. Meĉunardni jezik - zaŝto?	69
7. Finiĝis daŵriga kurso	88
8. Renkontiĝo de esperantistoj el Rijeka kaj LJublĵana ..	88
9. Raporto el Varsovio	89
10. Distribuita lingvo-tredukado - la nova perspektivo por esperanto	92
11. Manifestacio por paco en elementa lerneĵo "Vladimir Gortan"	93
12. Esperanto en Afriko - ŝu utopio?	94
13. Ivan Dolinŝek	96
14. Frakasita la peno de Hitler kapti Titon	99
15. Univerzalni pojmovi na esperantu, engleskom i hrvatsko-srpskom	104
16. Ni konatiĝu kun germana profesoro Rikardo Ŝulco	107

En la sekvanta numero vi povos legi diversajn aktuelajn artikolojn de niaj kunlaborantoj pri: 1. La fenomeno de internacia lingvo en Rijeka, 2. La 44-a Internacia ĵunulara kongreso en Zagreb kaj, interalie, pri la okazinta 73-a UEA kongreso en Roterdamo.

Redakcio



FENOMENO DE INTER NACIA LINGVO



EN RIJEKA



skribis: R. Šturm

Fenomeno de internacia lingvo en Rijeka

LA UNUA ORGANIZO DE ADEPTOJ AL INTERNACIA LINGVO SUR LA
TERITORIO DE LA NUNTEMPA JUGOSLAVIO FONDIĜIS EN RIJEKA
ANTAŬ 101 JAROJ

"Rijeka kroata urbo atestanto de pasinto - De Brseč kaj Vela
Vrata ĝis Mošćenice kaj Ventrinac, de Omišalj kaj Glavotok ĝis Vinodol
kaj Vrbnik kaj Kraljevica, ĉirkaŭ ĉi tiu urbo estas nek unu ŝtono kiu
ne parolus al ni pri sia trojike, sanga sudslava, kroata historio."

(Krlježa, 1952)

Ĝus esperis dezirate atendita nepre necesa "Povijest Rijeke"
(Historio de Rijeka). La unua fojon estas prezentitaj koncize sed
komplete kuradoj de la historio de la urbo sur Rječina. La libro estas
la unua integra historio de Rijeka skribita kroatserbe. Dankon al ĉiuj
ĝiaj verkintoj.

Centjara historio de la ideo kaj de la movado por internacia
lingvo ne povis trovi lokon en tia libro kia estas "Povijest Rijeke".
Tie kie oni intencis ĉirkaŭrigardi la integran vivon de la urbo ekde
ĝia ekesto ĝis hodiaŭ, tie kie oni volis percepti kaj prezenti mil-
jaran vivon kaj ĝin pritaksi en grandaj sintezoj, oni ne povis trovi

lokoj por la movado, kiu ja daŭras jam ion pli ol unu jarcenton, sed kio neniam estis tiom amase kaj influa por ke oni konsideru pri ĝi ion pli serioze, por ke oni donu al ĝi pli videblan gravecon kaj atentemon.

En antaŭparolo de "Povijest Rijeke" estis dirite ke ĝi estas nur probo pri sintezo de la historiaj okazintaĵoj, ke ĝi estas sintezo de la tuta historio de la urbo sur Rječina. Tamen verŝajne ankaŭ en tia historio, en kiu estas emfazita la fakto ke Rijeka estis ĉiam ekde lastaj jarcentoj, aperta, malfermita, internacia urbo - povus almenaŭ iom signifi la fakto ke la unua organizo de la adeptoj de nobla kaj humanisma ideo pri internacia lingvo sur la teritorio de la nuntempa Jugoslavio ekĝermis ĝuste en Rijeka, kaj ke la movado por internacia lingvo en ĉi tiu urbo dum la tuta jarcento ĝis la hodiaŭaj tagoj ĉiam havis kaj simpatiantoj kaj aktivulojn kaj la propran organizon.

Sendube ne bezarde sur ĉi tiu tero, en ĉi tiu urbo ekaperis antaŭ ol alie kaj pli ol alie intereso, kompreno, konsento kaj sentemo por la problemo de la komunikado inter homoj apartenantaj al diversaj lingvoj. Disponemo kaj inklino al internacia interkompreno kaj al internacismo entute ne aperadis nur en la kapoj de izolitaj unuopuloj por kiel universala nobla ideo, vana deziro, fantaziejo aŭ iluzio. Naskiĝis bezono por kuna, organiza agado. Kreiĝis la unua grupo, poste klubo, societo, asocio, ligo.

Dum la lastaj cent jaroj, kiel ankaŭ dum la tuta historio de Rijeka, plurfoje ŝanĝiĝis aŭtoritatoj, potenculoj, regantoj kaj la landlimoj tratreniĝis. En la slavo, kroata urbo regis fremduloj ĝis la fino de

**POVIJEST
RIJEKE**



le dua mondilito. Dum la Previzoro, ekde la Akordiĝo (1867) ĝis la fino de la unua mondilito, en Rijeka sur ĉiu paŝo resonadis kvar lingvoj: kroata, itala, germana kaj hungara. En la kroata gimnazio en Rijeka antaŭ cent jaroj oni lernis kvin lingvojn: po ok jaroj kroatan, latinon, italan kaj germanan, po sep jaroj grekan.

En la historio de Rijeka neevitebla estas la prilingva temo. En kroata urbo dum la mezepoko vivis ankaŭ homoj apartenintaj al diversaj nacioj, el tri lingvoj (kroata, itala, germana), el tri alfabetoj (glagolicea, latina, gotika). Eklezia lingvo de la katedralo en Rijeka estis nur kroata kaj ĝia alfabeto nur glagolicea. Publikaj, komercaj kaj aliaj dokumentoj estis skribitaj en la tiama internacia latina lingvo. Sur kroatan karakteron de la urbo Rijeka neŝan influis la uzo de itala lingvo. La tuta komerco sur Mediteraneo uzis tiam la italan lingvon.

Komence de la deksepa jarcento stabiligis ĉe meristoj kaj komercistoj, sed ankaŭ ĉe urbaj oficejoj kaj inter urbaj konsilantoj la itala lingvo; la latina estis repuŝita el magistrato, sed penetrita en eklezio. La kroata restis la lingvo de la popolo kaj de la privata komunikado en familio. Do: unu afero estis la hejma, gepatra lingvo, kaj dua afero estis la lingvo de komerco, de oficejo. Kaj unu kaj dua vivis apude en la tiama Rijeka, sed la plimulto de Rijekanoj en reciproka komuniĝo uzis la kroatan.

En la dua duono de la dekoka jarcento en la lernejo oni lernis du lingvojn: kroatan kaj italan. Dum la regado de imperiestrino Maria Terezia oni enkondukis la lernadon de la germana lingvo, ĉar oni devigis la administracion, la ĵuristaron kaj la klerigadon uzi la germanan. Tio en Rijeka ankoraŭ pli komplikis la lingvajn kondiĉojn, ĉar la uzo de la itala devis resti netuŝita en mara komerco kaj en komerca floto.

La specifaj cirkostancoj en kiu troviĝis Rijeka en la dua duono de la deknaŭa jarcento formigis apartan komercisten socian tavolon,

kiu estis laŭ la etna fundamento kroata, laŭ la apogo sur la kapitalo kaj politikaj rilatoj hungara, kaj laŭ la lingvo en publika komunikado kaj kulturologiaj karakterizaĵoj itala. Sed la laboristaro en Rijeka estis plurnacia kaj la gvidantoj de la laborista movado devis speciale konsideri pri internacia interligado. En la urbo estis agintaj du denaciigadaj procesoj: italiigado kaj hungarigado. La socialistoj en Rijeka akomodiĝis internaciisme al la kondiĉoj ekzistantaj en la urbo. En ilia agado ili uzis la kroatan, la italan, la hungaran, la germanan, eĉ la ĉeĥan lingvojn. La kroataj elementaj lernejoj estis nuligitaj.

Inter du mondmilitoj la urbo Rijeka sur la dekstra riverbordo de Rječina apartenis al Reĝlando Italio kaj travivadis malfacilan tempon de faŝista regado. Perforte estis forigita ĉio kio povus eĉ en detaloj memorigi al la kroata, aŭ al la slava karakterizo de la urbo.



Rijeka, Mrtvi kanal, ĉirkaŭ 1918/1919.

Elde bibliaj tempoj ĝis hodiaŭ homoj, iam pli multe iam malpli multe, sentis malbenon de lingvaj barieroj. Ekde Descartes kaj Leibniz ĝis hodiaŭ, en iom pli ol tri jarcentoj, estiĝis pli ol 300 provaĵoj

substitui la mezepoken latinan en moderne tempo per iu akceptebla internacia lingvo, kiu kontentigus pli bone la neprajn bezonojn de la mondo en kiu ni vivas, en kiu senĉese kaj ĉiam pli rapide multiplikiĝas ĉiuspecaj kontaktoj inter homoj el diversaj ŝtatoj, popoloj kaj lingvoj.

La grandaj distancoj oni trairas en ĉiam pli mallonga tempo. Novaj trafikiloj kaj komunikiloj (aviadiloj, radio, televizio, satelitoj) ĉiam pli kaj pli alproksimigas homojn. Oni veturas kaj vojaĝas ĉiam pli amase. Marco Polo devis spendi kvar jarojn por la distanco ekde Venecio ĝis Ĉinio, kaj tri jarojn inverse, returne. Tio estis en la 13-a jarcento. Kolumbo per sia karavelo tranavigis Atlantikon en du monatoj. Hodiaŭ oni povas Atlantikon transflugi en 4-5 horoj. La satelito ĉirkaŭflugas la Teron en 90 minutojn. La Granda Popolmigrado daŭris 270 jarojn, ekde kvara ĝis la sepa jarcento. Nuntempe ĉiujare vojaĝas pro plezuro pli ol 200 milionojn da turistoj tra la mondo. Nur en la regiono de Rijeka venadas ĉiujare tri milionoj da fremdaj turistoj, parolantaj diversajn lingvojn... Moderna Babelo.

El tiuj 300 provaĵoj de internacia lingvo preskaŭ ĉiuj restis nur venaj projektoj. La unua kiu transformiĝis en movadon estis Volapük, kies aŭtoro estis Johann Martin Schleyer. Lia libro "Volapük, die Welt-sprache" estis publikigita en la jaro 1880. Per tio komencis nova epoko en la historio de la ideo pri monda lingvo. En 1889, la movado volapükista kulminis: tiam ekzistis 283 societoj, 25 gazetoj, pli ol mil diplomitaj instruistoj, lernolibroj en 25 lingvoj, 384 libroj en Volapük. Post tiu jaro Volapük subite pereis. Kial? Volapük disvastiĝis kaj troviĝis realan apogon kaj praktikan aplikon nur en rondo de la meza kaj eta burĝaro kaj inteligencio. Al la kreskanta laborista klaso necesis facila kaj simpla interkomprenilo. Laboristoj kun simpatio akceptas ideon pri universala lingvo. Pri tio atestas la rezolucio, akceptite dum la Dua Kongreso de la Unua Internacio, sed tiuj simpatioj

ne povis fariĝi io reala rilate la artefaritan, elpensitan, forŝiritan de la vivo Volapükon, des pli estratan laŭ absolutismaj metodoj de Schleyer. Laboristaj kluboj kaj sindikatoj ne povis tion akcepti. Foresto de demokrateco kaj neglekto de naturaj leĝoj pri la evoluo de la lingvo rezultigis disfalon de la tuta movado Volapüka.

Jugoslavio donis senteblan kontribuon al interlingvistiko, al ideo kaj al movado por internacia lingvo. Aŭtoroj de diversaj projektoj de internacia lingvo estis Juraj Križanić, Blaž Kumerdej, Matija Majar, Peter Tomić, Stjepan Ivičević, Mojsije Paić, Jurij Humar, Anton Ertl, Stanislav Škrabec. Kiel volapükistoj kaj verkistoj en Volapük ĉe ni estis Ignac Herman, Mladen Pavić, Avgust Pokorn, kaj, antaŭ ĉiuj Juraj Bauer, kiu jam en la jaro 1885 publikigis gramatikon de Volapük sub la titolo: "Svjetski jezik Volapük".

Juraj Bauer estas la plej grava jugoslava mondlingvano ĝis tiu tempo. En Enciklopedio de Jugoslavio oni povas legi pri li: "Bauer Josip, lingvisto kaj matematikisto (Karlobag, 1848 - Zagreb, 1900). Profesoro pri matematiko ĉe zagreba realko kaj ĉe naŭtiko en Bakar. Unue adepto de internacia lingvo de Schleyer Volapük, poste proponis iujn reformojn en ĝi kaj fine li kreis novan internacian lingvon Spelin, konstruitan surbaze de lingvistika kombinatoriko". En bibliografio oni mencias ĉi tiujn verkojn de Bauer: Svjetski jezik - Volapük, Gramat blefik volapüka plo Koazänels e Serbänels, Sveobći jezik, Sprachwissenschaftliche Kombinatorik, Volapük und meine sprachwissenschaftliche Kombinatorik, Zwei sprachkombinatorische Spiele, Der Fortschritt der Weltsprache - Idee insbesondere meines Weltsprach projektes Spelin, Spelin, Wieder die internationaler Wörter und die Möglichkeit ei er Weltsprache, Verbesserungen und Zusätze zu meinen Weltsprache-Projekte, Prospekt des Spelin-Wörterbuches, Spelin-Wörterbuch.

Bauer estas aparte interesa al esperantistoj de Rijeka. Li naskiĝis en regiono Rijeka, en Karlobag la 22-an de aprilo 1948, kaj li mortis en Zagreb en la jaro 1900. La plej grandan parton el 52 jaroj de lia vivo li travivis en Rijeka kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Gimnazon li vizitadis kaj en la jaro 1866 finis en Rijeka. Ĉe tiu gimnazio li estis jam en la jaro 1867/68 "nemjesni učitelj" kaj instruisto de la latina, itala kaj germana lingvoj. Post la studo de matematiko kaj fiziko en Vieno kaj post farita ekzameno en Graz "por profesoron pri matematiko kaj fiziko en tuta gimnazio" unu jaron li profesoris en Zagreb kaj denove venis al Rijeka kiel profesoro ĉe la gimnazio. Post unu jaro li ankoraŭ unu fojon profesoris en Zagreb, ĉi foje preskaŭ kvin jaroj. El Zagreb li venis al Bakar kie li estis profesoro ĉe naŭtiko ĝis la jaro 1896 (ses jarojn). Kvar jarojn poste li mortis en Zagreb. 27 jarojn, tio estas pli ol duono de lia mallonga vivo, Bauer travivis en sia naskiĝregiono Hrvatsko Primorje, en Karlobag, Rijeka kaj Bakar.

Ĉiuj liaj verkoj estis eldonitaj en Zagreb, kaj sur ĉiuj estis signita Zagreb aŭ Agram, krom sur la lasta el la jaro 1892. Sur tiu lasta lia verko "Spelin-Wörterbuch" estas signita: "Bakar bei Fiume-Zagreb".

En naŭtiko de Bakar en "Matica i sposobnik za učitelje Kr. naučičke škole u Bakru" estas skribita ke profesoro Juraĵ Bauer parolas kroate, germane, itale kaj france, kaj ke li komprenas kaj legas ankaŭ en slovena kaj hispana lingvoj. En tiu "Matica" oni povas legi ankaŭ ke li "estis laŭdita de alta reĝa landa registaro ĉar li dum tri jaroj senpage plenumis bibliotekistan laboron en la reĝa gimnazio en Rijeka, donacinte apartenintan monon al la biblioteko por havigo de novaj libroj".

Juraĵ Bauer kaj lia verkaro influis, interalie, ankaŭ sur la tiam tre signifantan personon kia estis Tomislav Maretić. Slavieto Tomislav Maretić (1854 - 1938) estis la centra figuro de la lingvistiko en Krcatio. Li estis universitata profesoro, redaktoro de Akademio "Rječnik

hrvatskoga ili srpskoga jezika", aŭtoro de "Gramatiko kaj stilistiko de la kroata aŭ serba literatura lingvo", aŭtoro de "Jezični savjetnik" (Lingva konsilanto), tradukinto kroatserben de "Odiseado", "Iliado" kaj "Eneado", prezidanto de Jugoslavia akademio de sciencoj kaj artoj. Sub sugesto de Bauer, Tomislav Maretić en sia parolado antaŭ Jugoslavia akademio dum la solena kunsido parolis pri internacia lingvo. Tiu parolado titolita "Pensoj pri artefarita mondlingvo" (Misli o umjetnom svjetskom jeziku) estis presita kaj eldonita en la jaro 1892 en Zagreb.

Jen la vortoj de Maretić: "Eble iu estonta kulturhistoriisto al kiu ankoraŭ ne naskiĝis eĉ prapraavo de prapraavo skribos en iu sia libro aŭ traktato la jenajn vortojn: ni vere nepovas hodiaŭ al ni imagi kiel iam estis neoportune en la mondo, ĝis ne ekzistis unu universala lingvo. (...) La samtempuloj, kompreneble, primokis kaj priridis la nuran ideon pri artefarita mondlingvo, sed priridoj kaj primokoj ekzistis ĉiam ankaŭ okaze de aliaj inventoj, komenciĝantaj per provoj kaj ne tuj prezentiĝintaj sin en sia plena grandeco. Bona afero en tiu lingvo (Esperanto) estas en tio, ke oni povas per tre malgrandaj ŝanĝoj en sama radiko derivi substantivon, adjektivon kaj verbon."

Marinko Gjiivoje, fama jugoslavia esperantisto kaj aŭtoro de "Historio de Esperanto-movado en Jugoslavio" substrekas kaj emfazas: "Nur kvar jarojn post apero de Esperanto, kaj 17. jarojn antaŭ la apero de la unua lernolibro en Jugoslavio, la plej supera scienca institucio en la lando, Jugoslavia akademio de sciencoj kaj artoj en Zagreb, elmontras intereson pri la ideo de la mondlingvo kaj ankaŭ Esperanto. Tio okazis la 10-en de decembro 1891, kiam ĉe la solena kunsido de la Akademio unu el la plej kompetentaj jugoslaviaj lingvistoj, la universitata profesoro kaj akademiano Tomislav Maretić legis sian valoran studon "Pensoj pri la artefarita mondlingvo", kiu estis publikigita la sekvan jaron en "Rad", la organo de la Akademio.

"Ne estas dubo - diris Maretić - ke la neŭtrala mondlingvo glatiĝas multajn kverelojn kaj miskomprenojn inter la unuopaj pololoj ĉar ili pli bone ekkonus unu la alian, kaj ĝuste en tio kuŝas unu el la plej grandaj bonfaroj de la mondlingvo".

-Por pli ĝuste pritaksi la valoron de konstatoj de meritplena kroata filologo - skribis Gjivoje - ni memorigu ke Esperanto-movado estis tiam spenac en sia komenco (la unuaj esperantistoj en la lando aperis nur kelkajn jarojn pli poste). Post Maretić, kiam la internacia lingvo fariĝis sukca socia problemo, favore esprimas sin pri Esperanto la plej grandaj intelektuloj, politikistoj kaj verkistoj de tiu ĉi lando.

Mi menciis ĉi tie almenaŭ du nuntempaj elsteraj kroataj lingvistoj, universitataj profesoroj kaj ilian rilaton al Esperanto. Unu estas Dubravko Ĝkiljan. En lia libro eldonita en Zagreb 1980 "Rigardo en lingvistikon" (Pogled u lingvistiku) la arteferitaj internaciaj lingvoj ricevis apartan lokon. Esperanton la aŭtoro menciis kiel "tre popularan kaj disvastigitan". La dua estas Dalibor Brozović. En majo 1988 li ricevis grandan rekonon de la centra redakto de la Jugoslavia Enciklopedio "Miroslav Krleža". Mi citas ĉi tie el la artikolo publikigita en "Novi list" de 18-a de majo 1988:

"Objektiva aliro al fenomeno de la lingvo - Sarajevo, la 17-an de majo (Tenjog) - surbaze de la decido de Centra redakto de Enciklopedio de Jugoslavio, en Sarajevo okazigis kunveno de serbokroatistoj pri enciklopedia difino lingvo. Antaŭ la eminenta fakularo troviĝis ĉirkaŭ 5500 liniojn de teksto preparita de Pavle Ivić kaj Dalibor Brozović. Oni konkludis ke la tekstoj de Ivić kaj Brozović havas objektivan aliron al la tre komplika kaj tavoloita fenomeno kia estas la serba aŭ kroata lingvo. Ĉiuj recenzintoj konsentis ke la komplete manuskrito estas eksterordinare valora kontribuo, per kio estas superigite ĉio kio pri tio ĝis nun estis publikigita en enciklopedioj, kaj estis donita ankaŭ la sintezo kian ĝis nun ne ekzistas en literaturo. Unuanime konstato estas ke la tekston skribis sendube la plej eminentaj ekspertoj kaj tial ĝi estas granda akiro por Enciklopedio de Jugoslavio."

Profesoro doktoro Dalibor Brozović estas tre elstara jugoslavia esperantisto, esperantista verkisto, poeto, tradukanto kaj esperantologo. Por la movado de adeptoj al la ideo de internacia lingvo en regiono Rijeka konekte kun Brozović interesa estas unu kuriozaĵo. Dalibor Brozović konatiĝis kun Esperanto en 1940 pere de sia praonklo Milan Miholjević, kiu estis profesoro pri historio kaj angla lingvo en la nautiko de Bakar 1902-1920. Kaj tiu Milan Miholjević estis tre interesa persono. Interalie li havis interesajn interparolojn kun d-ro Zamenhof en Varsovio (pri supersignoj). Marinko Gjiivoje skribis iam ke pri tio publikigos pli vaste Dalibor Brozović.

Kvankam Juraĵ Bauer estis elstara adepto kaj batalanto por internacie lingvo (unue kiel volapükisto kaj poste kiel aŭtoro de Spelin kaj verŝajne postlasis en Rijeka kaj en Bakar iujn spurojn aŭ postsignojn, tamen li mem ne fondis societon aŭ klubon.

Iniciatintoj por fondi la unuan organizon de adeptoj al ideo de internacia lingvo en Rijeka estis Giampaolo Carminati kaj Leopoldo Smoquina. Guste el jaro 1885, kiam en Zagreb estis publikigita la unua libro de Bauer "Svjetski Jezik Volapük" lernolibro skribita en kroat-serba lingvo, Carminati kaj Smoquina komencis en Rijeka preparlaborojn por fondi klubon "Volapük". La klubo "Volapük" estis fondita du jarojn pli poste, en la jaro 1887. Kiun lernolibron ili uzis ne estas facile diveni, ĉu germana, kroata, itala? La lernolibro skribita en itala lingvo pri Volapük estis eldonita apenaŭ en la jaro 1888: "Assio Cattilio, Corso pratico-veloce di Volapük, Trieste - Fiume 1888".

Inter esperantistoj en Rijeka neniam estis iu pli granda interese por esplori historion de Volapük en ĉi tiu regiono. Sed esplorinte historion de unuaj esperantistoj kaj unuaj esperatistaj organizoj, trafoluminte malnovajn gazetojn elirintajn en Rijeka antaŭ la unua mondmilito, mi trovis du foje la mencion de la vorto "Volapük". "La Bilancia", taggazeto de Rijeka en itala lingvo, publikigis la 16-an de februaro 1889 sub la titolo "Musica in piazza" (muziko en placo) ĉi tiun informon: "Domani, incominciando a mezzodì, la banda cittadina si produrrà

in piazza Adamich ed eseguirà i seguenti pezzi musicali: 1.(...). 6. Polka francese Volapük-Komzak." (Morgaŭ, komenconte je tagmezo, la urba muziko muzikos en placo Adamič kaj ĝi efektiviĝos ĉi tiujn verkojn: 6. Franca polko Volapük-Komzak.)

La sama taggazeto el la jaro 1887, la 10-an de novembro alportis ĉi tiun informon: "Volapük. Tutti coloro che si occupano - a Fiume - dello studio di questa lingua mondiale sono pregati di far pervenire il loro indirizzo al signor Giampaolo Carminati." (Ĉiuj okupiĝantaj - en Rijeka - pri la studo de ĉi tiu mondlingvo, estas petataj sendi sian adreson al sinjoro Giampaolo Carminati.)

Nenion plu mi trovis en "La Bilancia" pri Volapük, sed tamen por illustri tiun tempon mi citus ĉi tie ankoraŭ du mallongajn informojn el la jaro 1901 el tiu taggazeto. Unu estas: "Corsi gratuiti di lingua ungherese. Presso la r. scuola ungarica maschile verranno anche quest'anno attivati corsi serali di lingua ungherese." (Senpagaĵ kursoj de la lingvo hungara. Ĉe la reĝa lernejo hungara maskla ankaŭ ĉi jare aktivigos la vesperaj kursoj de la lingvo hungara.). En la sama numero de "La Bilancia" mi trovis informon ke la urbo Rijeka en la jaro 1880 havis 18.000 enloĝantoj kaj 10.000 el ili estis analfabetoj.

En februaro de la nuna jaro venis el Szeged al Rijeka unu letero de d-ro Árpád Rátkai, elstara hungara esperantisto kaj esperantista verkisto. La letero estis sendita al Anjo Hurček, profesorino, esperantistino en Rijeka.

-Esplorante la historion de nia movado - skribis dro Rátkai - mi trovis interesajn detalojn pri Fiume, kaj nun mi informas vin pri tio, kaj samtempe mi petas vian helpon.

Dorsflanke mi skribos koncize ĉiun datumon, kiu mi scias pri la volapukista movado en Fiume kaj pri la Adriatika Ligo Esperantista. Pli multe mi ne scias. Mi interesiĝas pri pliaj detaloj de ambaŭ organizaĵoj, pri la agado de tiutempaj volapukistoj kaj esperantistoj, pri la biografio de la menciitaj aŭ aliaj, ĝis nun ne konataj personoj el

tiuj organizaĵoj. Aparte interesas min ia eventuala ligo inter la du organizaĵoj: ekzemple ĉu iu iama volapukisto post dudek jaroj fariĝis esperantisto?

Mi esperas, ke vi trovos ion, kaj kune kun miaj datumoj Vi eble publikigos artikolon en la loka gazetaro, ja ĝi estas unikaĵo: la unua internacilingva organizaĵo en la teritorio de la nuntempa Jugoslavio estis ĝuste en Rijeka.

La fonto de tiuj volapükistaj datumoj troveblas sporade en la jenaj libroj:

Rupert Kniele: Das erste Jahrzehnt der Weltsprache Volapük,
Ueberlingen, 1889.

Kerckhoffs: Volapük pedipedelas ninöL. Paris, 1889, p.145.

En Fiume jam en la jaro 1885 agadis volapukistoj. Post dujara preparlaboro fondiĝis la unua volapukista klubo en Fiume, en aprile 1887, kiu havis 52 membrojn. Ĝia fondinto kaj prezidanto estis Giampaolo Carminati /laŭ alia teksto Giampaolo/, profesoro. Tiu klubo estis la unua internacilingva organizaĵo de la tiutempa Hungario, kaj la unua internacilingva organizaĵo sur la teritorio de la nuntempa Jugoslavio.

En 1888 aktivaĵoj volapukistoj estis en Rijeka, krom tiu Carminati: Ugo Gherbaz, Enrico Simonich, Luigi Toth, verŝajne ankaŭ ili estis membroj de tiu klubo.

Tiu letero de d-ro Rátkai stimulis kaj instigis min fari iujn esplorojn, serĉante en la libroj, gazetoj kaj dokumentoj atingeblaj en Science biblioteko Rijeka kaj en Historia arkivo en Rijeka. Rezultojn de tiuj ĝismunaj esploroj mi donas ĉi tie. Ili ne estas dikaj kaj multnombraj dokumentoj, sed tamen valoregaj atestaĵoj pri la unua organizo sur tuta nuntempa Jugoslavio. Tiu unuaranga fakto en la historio de la movado ververe estas atentinda ne nur en Rijeka sed multe pli amplekse.

Jen la teksto de la peto de Giampaolo Carminati kaj Leopoldo Smocuina por aprobo de la klubo Volapük:



G^o 17
1887

Inclito Magistrato Civico!

La sottoscritta direzione provvisoria
del "club Volapük" ha l'onore d'invicare
a questo inclito Magistrato Civico lo statuto
in 3 esemplari, affinché venghi approu-
vato dall' autorità competente.

Di quest' inclito Magistrato Civico-

Fiume, 2 maggio 1887

La direzione provvisoria

Giuseppe Scriminà
Presidente

Leopoldo Imoguina
segretario

"Inclito Magistrato Civico!

La sottoscritta direzione provvisoria del "club Volapük" ha l'onore d'inviare a questo inclito Magistrato Civico lo statuto in 3 esemplari, affinché venghi approvato dall'autorità competente Di quest'inclito Magistrato Civico

Fiume, 2 maggio 1887

La direzione provvisoria

Giampaolo Carminati
presidente

Leopoldo Smoquina
segretario"

(Gloria urba Magistrato! La subskribita provizora direkcio de la "klubo Volapük" havas la honoron sendi al ĉi tiu gloria Urba Magistrato la statuton en 3 ekzempleroj, por ke estu aprobita de la kompetenta aŭtoritato de ĉi tiu gloria Urba Magistrato Rijeka, la 2-an de majo 1887 La provizora direkcio Giampaolo Carminati prezidanto Leopoldo Smoquine sekretario)

Ĉi tiun peton la Magistrato forsendis al guberniestro de Rijeka kaj li respondis ĉi tiel:

"Il Governatore Regio di Fiume e nel litorale ungerico croato al Magistrato civico in Fiume

Rimetto a cotesto Magistrato civico gli allegati del suo rapporto d'ito 4. maggio a.c. No 4142 coll'incarico di partecipare alla direzione provvisoria del club "Volapük" che l'istanza, onde poter venir presa in pertrattazione, deve kompletarsi con una traduzione autentica dello statuto nella lingua dello stato nonchè col protocollo della seduta, nella quale fù accettato il progetto dello statuto e fù eletta la Direzione provvisoria.

Fiume li 5. maggio 1887.

Zichy"

(La Rega Guberniestro de Rijeka kaj de marbordo hungara kroata al Magistrato Urba de Rijeka

Mi resendas al ĉi tiu Urba Magistrato la aldonoj de lia reporto datumita la 4-an de majo de la kuranta jaro No 4142 kun la devo parto-

S 17
1887


596

Al Magistrato civico
di Firenze

Presento al citato Magistrato civico gli allegati del mio rapporto d'ito 4 maggio a.c. N. 48112 coll'incarico di partecipare alla Direzione provvisoria del club. Volenti che l'istanza, onde poter venire presa in preaccensione, possa completarsi con una traduzione autentica dello statuto nella lingua dello stato, nonché col protocollo della seduta, nella quale fu accettato il progetto dello statuto e fu eletta la Direzione provvisoria.

Firenze li 5 maggio 1887.

Finley




Rijeka, la haveno 1887.

preni al la provizora direkcio de la klubo "Volapük kies peto, por ke ĝi estus povinta veni en pritrakto, devas kompletigi per aĝtenta traduko de la statuto en la lingvo de la Stato kaj ankaŭ per protokolo de la kunsido en kiu estis skceptita la projekto de la statuto kaj elektita la Provizora direkcio.

Rijeka, la 5-an de majo 1887.

Zichy)

Kedsürinde, en Historis arĥivo ne estas trovbla la statuto kaj la protokolo de la klubo "Volapük". nek en itala, nek en hungara (la lingvo de la Stato). Ĉiu kaj kiam kaj kial forprenis tiujn dokumentojn ? Ĉu ili estis forprenitaj post la unua mondmilito eble en Budapeŝt, aŭ ili pereis eble dum faŝisma regado inter du mondmilitoj?



Novos esti interesa ankaŭ ĉi tiu teksto de Urba Magistrato sendita al Guberniestro la 4-an de majo 1887:

"A Sua Eccellenza Il Signor Conte Augusto Zichy de Vásonykeo, Consigliere intimo di Sua Maestá Imperiale e Reale Apostolica, Reale Governatore ecc. ecc. ecc. Fiume

Magistrato Civico Fiume No 4142

Eccellenza!

Si ha l'onore di avanzare alla Eccellenza Vostra, per la ulteriore superiore approvazione lo statuto, accompagnato dalla relativa domanda per la istituzione di una società linguistica dal titolo di "Club Volapük", nel senso che da questa parte nulla osta nei riflessi politico-sociali a tale associazione. Fiume, 4. maggio 1887."

(Al Sua Eccellenza Il Signor Grafo Augusto Zichy de Vásonykeo, Intimo konsilanto de Sua Imperiestro kaj Reĝa Apostolica Maestá, Reĝa Guberniestro ktp.ktp.kto. Rijeka

Urba Magistrato Rijeka No 4142

Ekscelenco!

Oni havas la honoron sendi al la Via Ekscelenco, por pluan superan aprobon la statuton, kune kun la relativa peto por la instalo de lingvistika societo titolita "klubo Volapük" kun mencio ke flanko de Magistrato estas nenie obstaklo al tia asocio en politikaj-sociaj reflektaj. Rijeka, la 4-an de majo 1887.

Kiuj estis nomoj de klubanoj, de tiuj 52 membroj? Mi konas nur kvin el ili laŭnome: Giampaolo Carminati, Leopoldo Smoguina, Ugo Gherbaz, Enrico Simonich kaj Luigi Toth. Laŭ la nomoj la unua estas vera italo, la tri sekvantaj kroatoj, kaj la lasta povus esti kaj hungaro, kaj germano, kaj sloveno, kaj kroato.

Pri Giampaolo Carminati iom pli. Li naskiĝis en la jaro 1843. kaj mortis en Rijeka la 6-an de aŭgusto 1927. El dokumentoj troviĝintaj en Historie Arĥivo Rijeka oni ekscias ke li estis instruisto kaj lernejestro dum 34 jaroj. Kiam li eniris en sepdekan jaron de la vivo, li emeritiĝis. Tio estis en la jaro 1913. Nek unu tagon, dum la tuta lia ofico, li forestis el la lernejo. Post la kvar kaj duono jaroj de servo en popolaj lernejoj en Poreč (Istrio), li venis en la jaro 1881 al Rijeka kie li ekpostenis kiel instruisto de la miksa lernejo en Dronova. La sekvantan jaron li ekpostenis en la lernejo Plase, kaj tie li restis kiel lernejestro preskaŭ la tutan aktivan sian vivon. Ankaŭ lernejskocioj de Tornić, Pehlin kaj de Trščanska ulica estis sub lia estrado. Li havis du filinojn: Cesira kaj Medea.

En popolaj aŭ elementaj lernejoj en Rijeka oni tiutempe forte realigis itelizadon kaj hungarigadon. Nur tri periferiaj popolaj lernejoj havis ekde la jaro 1876 instruadlingvojn italan kaj "iliran" (kroetserban), sed ankaŭ tiuj tri (Dronova, Plase, Kozala) iom post iom estis iteligitaj. Rijeka tiam havis 12 "urbanaj" kaj elementaj maskle virinaj kaj miksa lernejoj. Unua elementa lernejo kun hungara kaj itala instruadlingvoj formiĝis jam en 1876, kaj pli poste ĝi agis nur hungare. Ĝis la jaro 1914 estis fonditaj 8 ŝtataj elementaj, "urbanaj" kaj

superaj, masklaj, virinaj kaj miksaj lernejoj, kaj ankaŭ 6 mezlernejoj ĝenerale kaj fokaĵ. Italigado kaj hungarigado de la kroataj junulero el Rijeka kad de tiu veninta el la ŝirkaŭaĵo estis ĉiam pli forte.

Post la fripona aneksado de Rijela al Hungario (1868) ekkomencis la plej malfacila periodo por la kroata loĝantaro kaj por la kroataj interesoĵ en Rijeka. Laŭ la hungara imperiisma politiko, Rijeka devis ekesti hungara urbo kaj saltotabulo por plian penetron en la Kroatan marbordon. Edukado kaj klerigado en Rijeka estis konstruitaj konforme al fremdeĵ ekonomiaĵ kaj politikaj interesoĵ. Ĝi evoluigis kontraŭ naciajn interesoĵn de la kroata loĝantaro kaj kontraŭ Kroatio el kiu Rijeka apartenis laŭ historia kaj nacia rajto. En edukado estis praktikita akra, perforte denaciiga politiko hungara kaj "autonomista". Guste al italo Garminati estis konfidita kaj komisiita la devo italiigi la kroatan junuleron en suburba komunumo Plase, kie li estis lernejestro de ĉiuj elementaj lernejoj (Plase, Turnić, Pehlin, Trščanska ulica) Li fervore servis al tiu politiko, bedaŭrinde.

Smoukins, laŭ nomo kroatdevena (Smokvica estas ofte kroata nomo), estis ankaŭ fervore servinto de la kontraŭkroata denaciiga politiko en Rijeka. Li estis unu el kvar instruistoj aŭtoroj de la lernolibroj (leĝolibroj) por elementaj lernejoj en Rijeka, eldonitaj en la jaro 1899. Tiuj lernolibroj estas vera ekzemplo de denaciigado, de kontraŭkroata sento kaj de hungara ŝovinismo. (Vidu: Milivoj Ĉop - "Školestvo i prosvjeta u Rijeci od 1918. do 1948. godine", Rijeka - Zagreb 1982).

Unu luma punkto en tiu densa mallumo estis en la oka dekada la laborista gazeto "L'operaio" (La laboristo) ĉar ĝi publikigis artikolojn en itala, hungara kaj en kroata lingvoj. La "plumbaj tempoj" daŭris ĝis la jaro 1899, kiam en Rijekan venis el Dubrovnik Frano Supilo. Kun li komenciĝas subita supreniro de "Novi list", taggazeto en kroata lingvo, ekestonta unu el gvidantaj politikaj organoj de la Monarkio. Poste ni vidos ke "Novi list" rolis senteblan rolan en la komenca vivo de esperantista movado en Rijeka.

Antaŭ ol treiri al Esperanto, ankoraŭ unu detalo por ilustrati la lingvan situacion en Rijeka: ĉi foje unu atestaĵon antaŭ 158 jaroĵ.

Eccellenza!

Si ha l'onore di avanzare alla
Eccellenza Vostra, per la ulteriore superiore ap-
provazione, lo statuto, accompagnato dalla re-
lativa domanda per la istituzione di una so-
cietà linguistica, dal titolo di «Club Volapük»,
col cenno che da questa parte nulla osta nei
riflessi politico-sociali a tal. associazione.

Uomo, 4 Maggio 1887.

Il Dirigente

3
firmato

A Sua Eccellenza

Il Signor Conte Augusto Riechy de Vásonykeo,
Consigliere intimo di Sua Maestà Imperiale e Reale
Apostolica, Regio Governatore ec. ec. ec.

Uomo

En la jaro 1890, vojaŝinte tra Eŭropo, venis al Rijeka kapitano ĉe la Supera stabo de Prusa armeo Otto von Pirch. Pri tiu vojaĝo li publikigis poste siajn impresojn. Jen mallongan citaĵon el lia raporto:

"Bela gastejo apud la poŝtejo akceptis min; tre bone oni estas alleĝata ĉe Toni Cucanić. La kelnero kiu min alparolis en franca lingvo kaj enkondukis min eniri, demandis la ŝlosilon de la ĉambro en itala kaj ordonis en kroata al mia veturiganto depreni me miajn aĵojn. Poste mi parolis germane kun li, ĉar la nia lingvo estas parolata ankaŭ ĉi tie, almenaŭ inter la personoj mezinstruitaj. La popolo parolas kroate kaj malbonan italan."

Sendube la tiama Rijeka estis kroata kaj samtempe iel kosmopolita. Ĝi svarmis per internacia atmosfero kaj diversaj lingvoj: urbo-haveno, fremdaj komercistoj, maristoj.

Volapük post la jaro 1889 agonis kaj malrapide foriris. Ĝis nun estas trovita neniu signo atestanta ian transiron de iamaj volapükistoj en Rijeka al Esperanto.

Inter la unuaj esperantistoj en Jugoslavio oni mencias la nomon de Marija Magdalena Filepić. Tiu nomo troviĝas en la Adresaro de Zamenhof el la jaro 1889 (du jarojn post la naskiĝo de Esperanto) inter la unuaj mil esperantistoj en la mondo, enskribita sub la numero 689. Pri Marija Magdalena Filepić oni scias malmulte. Ŝi ekestis esperantistino kiam ŝi estis 17-jara aŭ 18-jara fraŭlino.

Profesoro ĉe Pedagogia fakultato en Osijek, poeto kaj verkisto, esperantisto Antun Šimunić en sia verko "Obstine antaŭen" mencias ke la taggazeto de Osijek el la pasinta jarcento "Die Drau" informis ke la 30-en de januaro 1890 kapitano Eduard Filepić okazigis infanan aranĝon en kasino de Suba Urbo de Osijek kaj ke lia filino Marija Filepić ĉe tiu aranĝo ludis pianon. Eduard Filepić estis ŝipestro.

De kie Filepić en Osijek? Filepići estas la nomo ĉe unu suburbo de Rijeka. Filepić estas ofta nomo en Rijeka kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo. Tiu nomo ne troveblis en Slavonio.

En la periodo de perdo de velsipa floto, en tiu tempo de akra ekonomia krizo, multaj maristoj en Kroata marbordo restis sen laboro, sen ia gajno hejme. La maristoj ne povinte trovi laboron sur marŝipoj, direktiĝis al nordo, sur Danubon, sur riveran navigadon. Ilin allogis la sekureco de la ŝtata servo ĉe tiam jam forta La unua imperiestra kaj reĝa privilegita Danuba vaporŝipa societo, kies sidejo estis en Vieno. En la dua duono de la pasinta jarcento sur la riverŝipoj de tiu societo navigis tri Pilepić-oj, tri maristoj el la Kroata marbordo. Unu el ili estis kapitano Edoard Pilepić. (Ankaŭ la persona nomo Eduard, Edo, estas tre ofta en Rijeka kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.) Ĉe DDSG (Donaudampfschiffahrtsgesellschaft - Danuba societo de vaporŝipa navigado) Eduard Pilepić komencis servi la 1-an de aprilo 1865.

Interesa estus ekscii verajn motivojn kiel iu interesiĝas pri internacia lingvo. Kiel okazis ke la marista familio havis inklignon al Esperanto jam en tiuj unuaj ĝiaj jaroj? Maristo konstante venas en kontakton kun homoj parolantaj diversejn lingvojn, kaj verŝajne en tio kaŝiĝas la sekreto kiel li sentas bezonon pri iu universala komprenilo. Tio validas ankaŭ por rivernavigantoj. Sur la riverbordoj de Danubo, ekde Vieno ĝis la enfluo en Nigra maro, oni parolas germane, ĉeĥe, slovake, hungare, kroatserbe, rumane kaj bulgare. Kiu povas ellerni tion de lingvojn? Internacia lingvo ofertas sin kiel la ĝusta solvo.

La kapitano el Rijeka, veninta en tiu tempo al Danubo, sendube scipovis paroli plurajn lingvojn (kroatan, italan kaj germanan kaj eble ankaŭ anglan) sed ankaŭ tio estis nesufiĉe kaj en kelkaj cirkonstancoj neutile kaj neuzeble, ekzemple en Hungario aŭ en Rumanio.

Cu la patro (respektinde urbano de Osijek, okaziginta perinfanaranĝon kaj kies filino ludis pianon ĉe tiu aranĝo) mendis la unuan libron de Zamenhof por si al adreso de sia filino, aŭ la filino (verŝajne gimnazienino) kune kun iu ŝia koleginino aĉetis tiun libron kaj komencis lerni Esperanton, kiu povus tio melkovri post unu jarcento?

Maristoj regule ĉiam havas pli larĝajn kaj pli liberemajn mondriĝardojn ol homoj en profunda, lontana, izolita interlando. Tiel ne mirigas la fakto ke ankaŭ esperantistoj-pioniroj estas troveblaj inter la maristaro. Bons ekzemplo por tio estas la malnova urbeto Bakar en la komunumo de Rijeka, dek kilometrojn malproksime de Rijeka.

Bakar estas konata marista nesto dum pluraj jarcentoj. Ĝi okupas apartan lokon en la historio de internacia lingvo en Jugoslavio. La Marista lernejo (naŭtiko) en Bakar plezumadis elstaran rolon en la vivo de Bakar kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo, precipe por ke el ĝi naskiĝis bone edukitaj spertaj "kaphornanoj" (aŭ "hornkabananoj") de jugoslavia maristaro. Serio da famkonataj profesoroj, sciencistoj kaj verkistoj (kelkaj el ili eĉ mondfamaj) laboris kaj prelegis en la naŭtiko de Bakar: d-ro Āndrija Mohorovičić, profesoro de matematiko kaj fiziko, meteorologo kaj tre fama seismologo; Narcis Damin, profesoro, sciencisto kiu akiris mondan renomon en aranelologio; Juraĵ Carić, kapitano, profesoro pri naŭtiko kaj matematiko, pedagogo, verkisto kaj politikisto; profesoro Aleksandar Lochmer, aŭtoro de nia unua angla vortaro; profesoro d-ro Milan Drvodelić, fama vortaristo, ankaŭ li aŭtoro de la angla vortaro... Ili poste mi mencias almenaŭ du glorajn "hornkabananojn", du marajn lupojn el la epoko de velŝipoj.

Kiel esperantistoj, ni havas specifan intereson por iuj elstaraj personoj el la naŭtiko, nome al tiuj kiuj estis pli aŭ malpli ligitaj al la ideo de internacia lingvo. Iliaj nomoj estas: jam konata profesoro Juraĵ Bauer, profesoro Milan Miholjević (ankaŭ li jam menciita), profesoro Milivoj Miholjević, kapitano Branko Širola, inĝeniero Mirko (Ĝmeriko) Schönberger kaj esperanta verkisto Nikolo Hohlov.

Kiam en la jaro 1896, Bauer foriris el Bakar, unu knabo 12-jaraĝa apenaŭ komencis vizitadi la Maristan lernejon. Tamen, eble li konis profesoron Bauer, kaj eĉ eblas ke la profesoro donis al la juna ler-

nante la unuajn nociojn pri lingvo internacia. Tiu knabo estis Branko Širola, kiu pli poste estos grava persono en ĉi tiu priesperanta pri-skribo de Bakar. Sed sekvu ni pacience la kronologian ordon.

Ekde la jaro 1902 ĝis la jaro 1920 en la naŭtiko en Bakar pri angla lingvo kaj pri historio profesoris Milan Miholjević. Li parolis krom kroata, ruse, germane, angle kaj france. Dufoje li vojaĝis al Anglujo studi modernajn lingvojn. Li estis membro de "Društvo hrvatskih književnika" (Societo de kroataj verkistoj). Li kunlaboris en gazetoj kaj revuoj: "Narodne novine", "Napredak", "Great Thoughts", "To Morrow", "Travel" ktp. En Rijeka li publikigis, en la jaro 1914, sian libron "Dojmovi i uspomene" (Impresoj kaj memoroj), kaj en Zagreb en la jaro 1919 "The Yugoslav question with special regard to the Coast of the Adriatic" (Jugoslavia problemo kun speciala rigardo al la Adriatika Marbordo).

Miholjević ne estis esperantisto, sed li konis profesoron Bauer, li estis amiko de du elstaraj pioniroj de la esperantista movado en Kroatio, de Danica Bedeković kaj de Mavro Špicer. La plej interesa fakto por esperantistoj estas ke profesoro Milan Miholjević persone konatiĝis kun Zamenhof. Li parolis kaj diskutis kun Zamenhof pri la tiam tre diskutinda temo: pri supersignoj. Miholjević skribis en sia taglibro pri tiu renkontiĝo. Akademiano d-ro profesoro Dalibor Brozović, por kiu estas Miholjević trioble interesa (kiel parenco, kiel kroata verkisto kaj kiel homo kiu kontaktis kun aŭtoro de Esperanto) eble iam ion skribos pli amplekse pri tiu interesa temo. Milan Miholjević mortis en la jaro 1942 en Zagreb.

Mi jam diris ke la ĉefa persono de la rakonto pri Esperanto en Bakar estas Branko Širola. Li estas tre interesa persono, rara kaj elstara kiel maristo, kiel instruisto, kiel homo.

En la monografio kaj memorlibro "125. obljetnica pomorskog školstva u Bakru" (125. datreveno de la marista lernejo en Bakar), eldonita en la jaro 1974 oni povas legi:

"Politika kuraĝo,scienco spirito,sento pri aparteno al la propra popolo kaj aparte al la regiono de Bakar,forte ligitaĵ ornamas la virojn kiuj saĝe kaj honore evidas la lernejon kaj edukas novajn maristajn generaciojn... Iuj el ili per sia ekzemplo estiĝis modeloj ... Bakar,gasteme malfermita konko,estas ekirpunkto kaj gardanto de la kroata maristara tradicio,muzeo pri memorado de la homoj valoroj kaj ilia ĉiam viva fonto".

Pri Branko Ĉirola tie skribas: "Antaŭ nelonge mortis la lasta juroslavia komandanto de transoceanaj velŝipoj - Branko Ĉirola, la homo kiu en siaj taglibroj postlasis literaturan dokumenton pri iama vivo de maristoj."

En la jaro 1908,li estiĝis ŝipestro de "Contessa Hilda". Tiam li estis la plej juna ŝipestro an la Austria-Hungara Monarkio, kaj "Contessa Hilda" estis la plej granda velŝipo en la komerca floto de la monarkio,unu el la plej grandaj velŝipoj en la mondo de tiu tempo.

Per "Contessa Hilda" li ĉirkaŭnavigis la mondon, pasante preter Horna Kabo (la plej suda punkto de Suda Ameriko), preter tiu plej danĝera punkto en la tuta oceanaro, preter tiu punkto kie blogevas akraj ventegoj tre ofte.Ekzistas en Londono Societo de Kabohornanoj, nome de tiuj gloraĵ maristoj kiuj transnavigis Hornan Kabon velŝipe. Branko Ĉirola estis membro de tiu honora societo.Malmutaj povas diri pri si Kabohornano.Sed,ekzistas ankaŭ unu pli alta rango,por la elito inter Kabohornanoj: Majstro albatroso ("Master albatros").Tiu titolon ricevas nur tiu kabohornano kiu transnavigis Hornan Kabon en ambaŭ direktoj: navigante velŝipe de okcidento orienten kaj inverse de oriente okcidenten. (En la akvoj de Horna Kabo nur la albatrosoj senlace obstine spitas al ventegoj) Branko Ĉirola akiris ankaŭ tiun titolon. Li dufoje ĉirkaŭnavigis mondon preter Horna Kabo, de oriente okcidenten kaj de okcidento orienten.

De 1920 ĝis 1924 li estis instruisto pri na angla lingvo en

la naŭtiko Bakar. Poste li estis ŝipagento en Las Palmas (Kanariaj Insuloj) ĉirkaŭ 15 jarojn. Post la dua mondmilito li laboris en Rijeka, ĉe "Jadroagent".

Branko Ŝirola, krom la kroat-serban lingvon, bone parolis anglan italan, francan kaj hispanan, kaj sufiĉe bone germanan kaj rusan. Elstara naviganto-poligloto.

LA NOVAJO, KOMPARE KUN ALIAJ PROJEKTOJ, ESTAS EN LA UZO DE ESPERANTO KIEL PONTO-LINGVO INTER ORIGINALO KAJ LA TRADUKO. UZANTOJ DE TIU ĈI SISTEMO NE BEZONAS KONI ESPERANTON, KIU RESTAS KVAZAŬ "NEVIDEBLA". ĈU TAMEN EKESTOS KELKAJ AVANTAĜOJ POR ESPERANTO-PAROLANTOJ?

RESPONDO ESTAS EGE KONFIRMA!

UNUE, ESPERANTA TEKSTO AŬ PAROLO MULTE PLI FACILE ESTOS PRI-LABORATAJ KAJ UZATAJ. LA TRANSFORMO DE ESPERANTA ORIGINALO EN INTERNAN LINGVON, KIU TREEGE SIMILAS AL ORDINARA ESPERANTO, HAVOS LA AVANTAĜON DE DIREKTECO KAJ SIMPLECO. EN PERSPEKTIVO ĈI POVUS TUTE AUTOMATIGI, KONTRASTE KUN INTER-AGA DIALOGO HOMO-KOMPUTERO, NECESA POR ĈIUJ ALIAJ LINGVOJ. DO, TEKSTO AŬ PAROLO EN ESPERANTO ONI AUTOMATE, DIREKTE TRANSFORMOS EN LA TEKSTO AŬ PAROLO DE LA CEL-LINGVO.


DUE, ESPERANTO RICIĜOS PRENANTE NOVAJN TERMINOJN KAJ ESPRIMOJN. VOLE-NEVOLE PONTO-LINGVO DEVAS SPUGLI ĈIUJN NUANCOJN DE AMBAŬ LINGVOJ (ORIGINALA KAJ TRADUKA). TIEL ĈI ENHAVUS LA PLEJ NOVAJN FAKTERMINOJN, TIOM BEZONATAJN EN ESPERANTO.

TRIE, LA DLT FUNKCIANTE KOMPRODUKTOS ESPERANTAJN TRADUKOJN, KVANKAM ILI RESTOS INTERNE KAJ PERDIĜOS. SE ESPERANTISTOJ VOLUS AŬ POVUS ORGANIZI LA KONSERVADON, SELEKTON KAJ DISTRIBUON DE TIU SUPOZERLA KAJ GRANDEGA SCIOFONTO, ĈI FARIĜUS

LA NOVA INSTIGILO POR DISVASTIGO DE ESPERANTO KIEL LINGVO INTERNACIA. LA KVANTO DE ESPERANTO-TRADUKOJ ESTOS LA SUMO DE ĈIUJ TRADUKOJ FARI-TAJ PERE LA DLT SISTEMO! KVAZAŬ NE-IMAGEBLA AVANTAĜO POR ESPERANTO, NUR SE ONI TROVOS RIMEDOJN KAJ MOJN POR KONSERVADO DE INFORMOJ. FELIĈE, EN PROKSIMA ESTONTO KOMPUTILAJ MASMEMOROJ ESTOS TRE AMPLEKSAJ KAJ MAL-MULTEKOSTAJ.

RESUME, LA NOVA KONCEPTO DE LA DLT FAVORAS ESPERANTON, DO MONDAJ ESPERANTO-ORGANIZOJ DEVUS TIUSENCE SUBTENI LA PROJEKTON DLT, KAJ PROPONI ĈIAN PLIAMPLEKSIĜON LAŬ LA MENCIIITA ASPEKTO.

Slobodan Vitolović



Manifestacio por paco en elementa
lernejo „Vladimir Gorkom“

La 6-an de oktobro nia lernejo „Vladimir Gorkom“ okazigis la Manifestacion por paco.

Membroj de lerneja esperanta sekcio:
Vedran Rasol, Alen Karićević, Dijana Perhat,
Nataša Rončević, Kristina Đurmić, Gordana
Dokmanović (VII klaso), Marijana Erceg kaj
dijana Horšić (VI klaso) kaj Andrej Grosdornov
(V klaso) partoprenis en ĉi tiu Manifestacio

Nia subtenilo estis jene: ĉiu parolis unu
frazon, kaj Gordana simultane tradukis en
serbo-kroata lingvo.

Nia aldono al Manifestacio por paco
estis la poemo de Grigor Vitez „Spomenik u
Hirošimu.“ dijana diris kelkajn vortojn pri
japano-krukaĵo Sadato Sasaki. Nataša
recitatis esperante „Monumentoj en Hiroŝimo“
kaj Kristina recitatis kroate.

Publiko estis tre kontenta kaj rekompencis
nin per longa aplaŭdo.

Gordana Dokmanović
lernantino de VIIa klaso de elementa
lernejo „Vladimir
Gorkom“

(6.10. '87.)



Salutparolado de junaj esperantistoj

Esperanto en Afriko – ĉu utopio?

Kien ajn oni turnas sin - legante revuojn kaj gazetojn, vizitante kongresojn kaj aliajn renkontiĝojn, uzante Pasportan servon, eĉ korespondante kun gesamideanoj el aliaj landoj, ĉiu uzanto de Esperanto, vole-nevole, devas konfesi, ke ĝi centjariĝinte ne atingis sian plenan internaciecon - faktoj montras, ke la plimulto de aktiveco en aŭ pri Esperanto ĉirkaŭiras neeŭropajn landojn, precipe Afrikon.

Jes, jubilea kongresoj en Pollando montris, ke ekblovis "afrikaj ventoj" - oni havis okazon renkontiĝi kun kelkaj gesamideanoj el afrikaj landoj, kiuj helpe de UEA kaj kadre de ĝia aktiveco "Esperanton en la trian mondon" partoprenis jubilea aranĝojn en Jugoslavio, Hungario kaj Pollando. Laŭ mia opinio bone, sukcesoplene kaj fruktodone.

Ĝuste internacian etoson dus Jarmilana kongreso en Krakovo, belsena kaj belnigita prezentado de afrikaj gesamideanoj kaj precipe miaj personaj kontaktoj kun kelkaj el ili, igis nin atenti la problemojn de esperantismo en Afriko.

Malaktante ĉi-momente la plej grandajn problemojn de la nigra kontinento - militatecon, neevoluntecon kaj militojn, ni atentigu pri la problemoj kiu profunde interplektiĝas kun supra menciitaj - pri la lingvo-problemo forte ligita kun neokolonialismo. Ĉiujn ĉi lingvoj estas parolataj en Afriko - ĉu vi krom araba kaj svahila foje aŭdis pri ambara, tigr, galla, zuava, ŝikha, haŝa, ŝalla, jaruka ...?

Bedaŭrinde, post skiro de sendependeco la plimulto de la landoj daŭre kiel oficialan ŝtatan lingvon uzas lingvojn de siaj koloniistoj (anglan, francan, portugalan, italan, germanan kaj hispanan - subite io konata, ĉu ne?) kvankam - ho, kia paradokso - koncernan lingvon en tiuj landoj parolas nur du ĝis kvar procentoj da privilegiaj loĝantoj. Por la ŝtata aparato estas bedaŭrinde pli facile daŭrigi kun ĝisnuna oficiala lingvo ol provi ŝanĝi ion en la lingva politiko, ĉar - kiel trovi komunan denominatoron inter dekoj da tute malsamaj lingvoj parolataj de la popoloj en koncerna lando? Restas do komunikado en la lingvoj de ĝisnunaj mastroj, kvankam por la plimulto de la loĝantoj tio signifas resti en la mallumo de nescio kaj nekompreno.

Jen la perspektivo de facila, simpla, malmultekosta kaj akcetinde - neŭtrala Internacia lingvo, kiu ne nur povas esti ponto-lingvo inter afrikanoj mem, sed ankaŭ signifas kontakten kun cetera mondo.

Ĉu tio restos utopio aŭ fariĝos realeco kompreneble dependas de multaj faktoroj, sed ni, spertaj esperantistoj, estas unu el ili.

Ni helpu movadon en Afriko! Ni komencu per simpla korespondado, helpu al (kvante) malfortaj kluboj per sendado de propaganda materialo - glumarkoj, afiŝetoj, bildkartoĵoj, lernolibroj, ni sendu al nia korespondanto gazetojn aŭ revuojn kiujn ni traiegis kaj eble post unu jaro forĵetos ilin, se niaj financaj eblecoj permesas, ni donacu abonon... Individuaj kaj klubaj kontaktoj montru kaj pruvu ke Esperanto ne estas nur lingvo. Ni konsideru tamen, ke la poŝto povas esti malkurata, kio dependas de la regiono, kaj foje povas daŭri monatojn ĝis venas respondo.

Fine, ĉi sube mi kuraĝas aldoni kelkajn adresojn, eble kun via nova amik(in)o vi renkontiĝos dum la kongresoj en Abigano kaj Madagaskaro en 1989.

MI certe!

1. Bunda Esperanto-grupo
1051 BUNDA, MARA, TANZANIO
2. ESPERANTO-KLUBO "NOVA SENTO"
B.P. 13169 LOME, TOGO
3. S-ro AKPA FRANCOIS
a/o ECOLE DE BASS DE CADJÉHOUE
B.P. 434 COTONOU, BENINO
4. S-ro ALPHONSE DIAITA
VILLA NO 218
H.L.M. PASS, DAKAR, SENEGALIO
5. S-ro JEAN-PIERRE DENIS
COLLEGE WILLIAM PONTY
05-BP 671 ABIDJAN 05, EBURBORDO



Juna Afrikano trairas la riveron.

Por pliaj adresoj petu liston de aktualaj korespondpetoj el Afriko ĉe kunordiganto de la poresperanta agado en Afriko Ĉe UEA/TEJO:

s-ro HANS BEKKER, Kastelenstraat 231, NL-1082 AMSTERDAM, NEDERLANDO

Li mem kolektas ĉiujn informojn pri ĝiuspecaj kontaktoj kun Afrikanoj kaj antaŭdankas la helpon pere de kiu li ĝisdatigas la administradon, kiu servas por konduki kaj subteni la afrikajn lernantojn.

Ivan Dolinšek



"Krom kroat-serban, mi konis italan, germanan, francan, rusan, hispanan kaj Esperanton"- tion deklaris Ivan Dolinšek antaŭ kelkaj dekoj da jaroj, skribinte sian propran biografion. Tiu lia autobiografio troviĝas en la libro "Zbornik sećanja jugoslovenskih dobrovoljaca u španskom ratu" - "Ŝpanija 1936-1939", Vojnoizdavački zavod, Beograd, 1971.

Pri Ivan Dolinšek oni povas legi en tri tomoj de menciita "Zbornik", en la dua, la tria kaj la kvara tomo. Pri li skribis tie Ivo Bodlović kaj Djuro Birovljev. Por ni, esperantistoj, ĉio el lia revoluciula vivo povus esti interesa, ĉar ĉe li internaciismo estis neekpensebla, neimaginebla sen Esperanto.

Ivan Dolinšek naskiĝis la 6-an de aŭgusto 1914 kaj mortis en Rijeka la 24-an de januaro 1988. Li esperantiĝis dekok-jara en Zagreb, en la jaro 1932. Li vivis, do, kiel esperantisto 56 jarojn. Vera veterano! Esperanto signifis por li internaciismon, fratecon inter homoj, precipe inter la laborista klaso; Esperanto signifis por li la lingvon de la laboristoj en la tuta mondo.

Ivan Dolinšek devenis Rijekano kiam li estis kvar-jara. Li naskiĝis en Trpčane apud Ilirska Bistrica. Veninte vivi en la urbon, tiam okupantan de Italio, iliaj gepatroj tamen ne volis sin deklari laŭ ŝtataneco italoj, sed jugoslavianoj, kaj ilia filo vizitadis ne la lernejon en Rijeka, sed en Sušak. Jam kiel knabo li scipovis paroli pli ol unu nuran lingvon, sed ankaŭ kiel knabo li jam scipovis kaj eksentis kion signifas faŝismo kaj mallibereco.

Kaj pri klasbatalo kaj pri Esperanto li eksciis en Zagreb, kie li en la kadro de sindikatoj vizitadis esperantan kurson, en la jaro 1932. Post du jaroj, en la jaro 1934 li devenis laborista sindikata funkciulo en Sušak. En tiu sama jaro li jam gvidis esperantan kurson en la ejoj de URS-aj sindikatoj. (La plej bona lernanto en tiu kurso estis nia societano Rudi Medved, kaj ankaŭ li unu jaron pli poste gvidis novan poresperantan kurson.)

El Sušak Dolinšek foriris en Francion. Tio okazis, ĉar li estis en Sušak persekutita kaj en danĝero esti arestita pro siaj

progresemaj ideoj kaj pro sia politika agado (disvolvado de la laborista kaj marksiista literaturo). En la jaro 1935 li estis jam membro de la ilegala Jugoslavia komunista partio. Laŭ la direktivoj de la KPJ, en la kadro de KPF, li agadis politike inter la slovenaj kaj la kroataj laboristoj en Francio.

En la regiono Pas de Calais, kie li laboris kiel minejlaboristo, en oktobro 1936 li foriris Parizon kaj de tie Perpignanon por transiri en Hispanion, en la militon kontraŭ faŝismo. Unue en Barcelonan kaj poste en Valencian, li venis kiel batalanto, volontulo, membro de internaciaj brigadoj sub la nomo Juan Ferraro. Sian revoluciulan interbrigadistan vivon li komencis la 15-an de novembro 1936. en Albacete, en la Unua roto de la Oka bataliono "Ĉapajev", de la Dektria internacia brigado "Dombrovski". Estro de tia roto estis Rijekano Kazimir Krušnjak, kaj komisaro de la roto Milan Kalafatić. Entute la roto enhavis 46 Jugoslavianoj (inter ili estis ankaŭ Ivan Krajačić).

Sur la frontoj de Hispanio li ĉeestis en multaj gloraj bataloj por defendo de Madrid, kaj sur la frontoj de Guadalajara, Aragon, Ebro... Dufoje li estis vundita. Apud Teruel en decembro 1936 li estis vundita je la dekstra brako. Post la kuracado en malsanulejo en Valencio, en januaro 1937 denove li troviĝis en Albacete.

Ĉar li parolis sep lingvojn, li laboris en la poŝto por internaciaj brigadoj, en la sekcio de la cenzuro. Je la fino de la jaro 1937 li ekestis interpretisto ĉe sovetaĵ konsilantoj.

Dum la defendo de Madrid li estis ekde februaro 1937 ĉefserĝento kaj politika delegito de la Dekunua kontraŭaviadila baterio. En marto 1937 sur Guadalajara; en julio 1937 ĉe Bruneta vundita en kapon, bruston kaj gambon faraviadila bombo. Post eliro el la malsanulejo en Madrid, li ekestis interliga oficiro en la rango de kapitano, en la stabo de la divizio de kontraŭaviadila defendo. Sur la frontoj de Aragon li estis ekde fino de aŭgusto 1937 ĝis septembro 1937 - ne longtempe, sed tamen estis terura la vivo sub la varmeĝo de pli ol 40 gradoj. (Aragon estas la Saharo de Hispanio). Sekvas Barcelona ĝis decembro 1937. Ofensivo sur Ebro ekde fino de julio 1938 ĝis novembro 1938. Juan Ferraro trarompis malamikajn liniojn kaj savis la baterion veninte ĝis Gerona. Pro tio li ricevis medalon por kuraĝo en la ĉefstabo en Lérida. En decembro 1938 en Barcelona la adiaŭa mitingo por internaciaj brigadoj. Festa enmanigado de memordiplomoj kaj reiro al la franca landlimo, sed denove - sur fronton, en la Balkanan batalionon. Refoje al la franca landlimo en februaro 1939.

Juan Ferraro, Ivan Dolinšek transiris la limon la 10-an de februaro 1939, kune kun homa torento konsistinta el 500.000 emigrintoj, batalintoj, virinoj, infanoj, maljunuloj, rekte en la francajn koncentrejojn.

Pri Dolinšek, en la tria tomo de la libro "Ĥpanija 1936-1939" Ivo Bodlović ĉi tiel mencias: "la 27-a de decembro 1937, Teruel. Dok oko mene padaju poginuli i ranjeni drugovi, Dolinšek skataĉe u jedan kanal, preuzima zastavu od ranjenog zastavnika, podiže je visoko, ali i njegova ruka, pogođena zrnem, pada".

Duro Birovljev skribis en la kvara tomo: "Negde sredinom maja 1940.g. iz logora Girs, gardmobilci odvođe dra Milovana Ĉetkovića, Ivana Dolinšeka i mene na rad u jedno selo kod Lila". En tiu libro troviĝas fotografaĵo el Gurs, el la jaro 1939. Sub la fotografaĵo la nomoj: Guido Nonvejer, Atleto, Joso Vrdoljak, Ivan Ropac, Ivan Dolinšek, Ŝiško, Peruško, Milan Kalafatić.

El la koncentrejo Gurs, Dolinšek fuĝis en Belgion kie li estis kaptita de germanoj kaj ili lin forkondukis en koncentrejon Felsenkeller. De tie li fuĝis en Austrion, en Vienon, kie li kontaktis kun aŭstria rezistomovado kaj tie li kunlaboris kun aŭstriaaj membroj de Komunista partio kaj kun aliaj kontraŭfaŝistoj. Post la liberigo de Vieno li laboris iun tempon kiel interpretisto ĉe la stabo de sovetaĵ unuoj, kaj poste li revenis patrujon.

Ivan Dolinšek ricevis plurajn ordenojn por sia revoluciula agado. Ĉe la lasta adiaĵo sur la tombo de Ivan Dolinšek parolis Josip Licul en la nomo de interbrigadistoj, Branko Vlah en la nomo de la Ligo de batalintoj kaj Berto Petro en la nomo de Sindikato. Ili salutis interbrigadiston, batalinton por la libereco kaj veteranon de la sindikata movado. Ĉeestis ankaŭ sep esperantistoj el Rijeka.

Rado Ŝkalamera

Umro španski borac
Ivan Dolinšek



Umro je Ivan Dolinšek. — Ferraro, revolucionar i stalinski španski borac i kapetan dobrovoljačkih jedinica. Svoje pokrete otpora u Austriji, a nakon povratka u oslobođenu Jugoslaviju obavljao je razne odgovorne zadatke u privredi i u društveno-političkim organizacijama.

Rođen 6. kolovoza 1914. godine u Travanama kraj Tuzle. Bliže Blatice zbog radikalnih ideja brzo dođe u sukob sa tadašnjim vlastima, rastura naprednu radničku i marksističku literaturu. Zbog prijetnje hapšenjem od Francusku gdje se povezuje s KP, a po direktivi KPJ u slovenačkim i hr...

~ 1936.

Novi list, 25.01.1988.



Frakasita la peno de Hitler kapti Titon

LA ĈEVALSALTO

La ĉevalsalto, aŭtoro Petar Mišković, tradukinto Senad Ćolić. Aerinvado al Drvar en 1944, Epopeo kaj historiaj faktoj, Eldonis ELBIH, Sarajevo, 1986, paĝoj 88, broŝurita, dek bildoj, 3 skizoj. Eldonkvanto 2000. Dekkvar-paĝa enkonduko de la eldonisto sub la titolo: Kontribuo de Jugoslavio en la dua mondmilito.

ELBIH eldonis jam serion da libroj el politika literaturo: du verkojn de Tito (La nealianciteco - konscienco de la homaro, kaj Por unueco kaj aŭtentaj principoj), tri verkojn pri Tito (Tito kaj nealianciteco, La legenda militestro, Tito pri Esperanto) kaj sciencan studon de Edvard Kardelj: La historiaj radikoj de nealianciĝo.

Anksaŭ "La ĉevalsalto" apartenas iom al tiu serio, ĉar temas pri Tito, kvankam, aliflanke, oni povas ĉi tiun libron envicigi en la historian literaturon, aŭ pli ĝuste en la milit-literaturon. La aŭtoro mem en mallonge antaŭvorto tre koncize kaj trafe konstatas: "Tiu ĉi libro rakontas surbaze de aŭtentaj fontoj kaj dokumentoj pri unu el la plej gloraj bataloj de la jugoslavia revolucio, pri herosa rezisto de batalantoj kaj popoloj en la bosnia urbeto Drvar dum la subita germana aerinvado en 1944 kies ĉefa celo estis likvidi estraron de la popolliberiga movado kaj ĝian gvidanton, marŝalon Titon".

Esperantujo havas, do, ankoraŭ unu fojon okazon ĝui la rakonton pri la fama batalo en Drvar, kie Tito disfrakasis atakon de Hitler kaj lian intencon senkapigi la Popolliberigan Armeon de Jugoslavio. Ĉi-foje la malpotenco de Hitler kapti Titon estas rakontita per unu tuta libro. Antaŭ 34 jaroj la evento estis priskribita nur kiel unu inter multaj detaloj, sur kvar paĝoj, en la dika libro de Vladimir Dedijer pri biografio de Tito, en tre bona Esperanta traduko de Mason Stuttard.

Hitler kun tuta sia forto estis nepovinta malebligi al Tito eskapon kaj savon el fortega aeratako, el bombardado, el paraŝutistaj SS-trupoj spogataj de fortaj motorizitaj batal-unuoj. "La ĉevalsalto" priskribas kiel tio okazis.

"La ĉevalsalto" entute ne estas legaĵo peza, tro faka, militistar studejo por malvasta rondo de fakuloj. Ĝi estas nek teda "oscadiga unuflanka propagandilo", sed honeste skribita raporto pri historiaj faktoj, pri unu eksterordinara evento elinter la brilaj ekzemploj de kvarjars batalo por nacia libereco kaj sendependeco.

Temas pri tre serioza, sanga batalo kaj pri kruda milita vivo, pri vivo nek amuza nek distra, sed la sinsekvo de la priksribitaj okazintaĵoj kaj la facila stilo estas tiom interesaj, tiom riĉaj je neordinaraj surprizecoj, je neatenditaj situacioj ke granda plimulto de la libro fariĝas legata per strefta atento kaj haltigita spiro. Frandaĵo. La leganto de paĝo al paĝo ĉiam pli kurioze sekvas la esceptan dramecan evoluon sur batalkampo kvazaŭ spektante rapidkurantaĵn bildojn de iu bonefarita larĝekrana filma scenejo. Fulmrapide ŝanĝiĝas la scenejo. Tagnoktaj bataloj en kiuj ne horoj sed minutoj estis ŝarĝitaj per novaj okazintaĵoj. En iuj momentoj la leganto eksentas kvazaŭ la realo transformiĝas en legendon. Realisma rakonto devenas kvazaŭ fabela evento, historia persono devenas legenda figuro, historiaj faktoj kvazaŭ imagitaj mirindaĵoj. Kaj ĉiuj tiuj bildoj estas esprimitaj per simplaj, klaraj, facile kompreneblaj vortoj.

Drvar fariĝis unika urbo en la tiel nomata "eŭropa fortikaĵo" de Hitler. En Drvar estis la sidejo de la Supera Stabo de la Popolliberiga Armeo de Jugoslavio. Tie estis Tito. Tie estis militaj reprezentantoj de la aliancanaj armeoj: soveta delegacio kaj oficiroj de la angla (Randolph, filo de Winston Churchill) kaj usona militmisioj. Drvar estis la sola urbo en la okupita Eŭropo en kiu troviĝis militaj reprezentantoj de ŝtatoj de kontraŭhitlera koalicio. La militoperaco "ĉevalsalto" estis unu el la plej esceptaj kaj plej delikataj entreprenadoj kiujn la germanaj militfortoj plenumis dum la periodo dum la dua mondmilito. La estro de la Tria Regno Adolf Hitler mem estis iniciantinto de tiu operaco. Jam en la jaro 1943 la kapo de Tito estis ĉantaĝita je 100.000 oraj germanaj regnomarkoj.

Kiel en aventuraj romanoj oni zorgotreme travivas danĝerajn situaciojn timante pri la sorto de la ĉefa heroo, tiel legante "La ĉevalsalton" oni ofte ekpensas ĉu sukcesos kaj kiel sukcesos Tito eliri el teruraj okazaĵoj, kiel li eskapos al faŝistaj ĉesistoj al homo. Estis infero. La sola sukceso de la plej elita aerinvada germana batalgrupo "Pantero" estis la konfisko de la marŝala uniformo de Tito, en tajlorejo de Supera Stabo.



Tito en Drvar, 1944.



La libro estas ilustrita per dek fotografiaĵoj, dek impresaj dokumentoj. Inter ili eble la plej impresa estas bildo montranta kiel germanaj soldatoj priesploras militkaptitan partizaninon pri sidejo de la Supera Stabo kaj pri restadejo de Tito.

Nun jen kelkajn rimarkojn. Aŭtoro Petar Mišković interese skribis kaj Senad Čolić bone tradukis. Tamen kelkaj paĝoj estas tre ŝarĝitaj per nomoj kaj mallongigoj (propraj nomoj, loknomoj, nomoj de politikaj, armeaj kaj aŭtoritataj organizoj kaj instancoj). Eble en tiaspeca literaturo ĉi tio ŝajnas preskaŭ neevitebla, sed tamen ĝenas.

Propraj nomoj de iuj konataj personecoj estas (neglekte aŭ pretervide) malĝuste skribitaj (Churchil anstataŭ Churchill, Fitzoj Mac Lean anstataŭ Fitzroy MacLean, Sreten Ĵuljević anstataŭ Sreten Žujović, Meteoti anstataŭ Matteotti). Nekonsekvence estas skribitaj aliaj nomoj. Loknomo Banja Luka ripetiĝas multfoje en tri diversaj formoj: Banja Luka, Banjaluka kaj Banja-Luka. Ĉe la geografia nomo Kroata Ĉemarujo oni ne scias ĉu temas nur pri Hrvatsko Primorje (malgranda regiono kies ĉefa urbo estas Rijeka) aŭ ankaŭ pri Dalmatio, do pri la tuta kroata marbordo. (Ĉu oni diru: Marbordlando, Apudmarujo, Apudmario, aŭ Ĉemarujo?) En la teksto de la verko la nomoj estas skribitaj kiel oni ilin Esperante legas (nur la unuan fojon oni donas ankaŭ la originalan formon). Sed, nekonsekvence, oni ne skribas "firer" sed nur "Führer", ne "reselŝprung" sed nur "Rösselsprung". Kontraŭe al tio, oni skribas nur "Abver" kaj nenie "Abwehr".

Se la nomo estas von Varnebichler, oni devus lin legi fon Farnbichler kaj ne fon Farnbiler. Hans Zig estas verŝajne Hans Sieg.

La nomojn de brigadoj kaj divizio el regiono Lika oni skribis Dua lika brigado, Tria lika brigado, Sesa lika divizio, likaj proletoj, likaj trupunuoj, ktp ĉirkaŭ tridek fojojn. Ĉe nejugoslava esperantisto tiaj esprimoj povus esti tute konfuzigitaj, ĉar ili naskiĝas nekonvenan asocion. Lika signifas serbo-kroate propustan, propustljiv, propuŝatajuĉi, ŝupalj. Laglora Sesa divizio ne estas ŝuplja, nek ekzistas ŝuplji proleteroj, ŝuplje jedinice, ŝuplja brigada. Lika estu eble en esperanto Likao kaj liĉki likao.

Ankoraŭ unu nekonvena esprimo: bataleto. Ekzemploj: "akraj bataletoj", "plej fortaj bataletoj", "gravaj bataletoj", "post fortaj bataletoj", "dramecaj noktaj bataletoj", "plurhoraj dramecaj bataletoj". En ĉiuj tiuj kazoj la vorto bataleto estas maltaŭga, asocias al io infanca, neserioza. Ĝi povus esti ŝanĝita per lukto aŭ per pafado, fusilpafado, interpafado, kunpuŝiĝo, interpuŝiĝo, kolizio...

La nomo de la komandanto de la Tria dalmata brigado verŝajne estus Vlado Pezelj kaj ne Vlado Pezelja.

Esprimo "ega proksimeco" sonas iomete strange, kontraŭdire, simile al "zdravo boletan". Anstataŭ "la urba tombaro" pli konvene estus "la urba tombejo" (kiel tradukis Mason Stuttard kaj kiel estas la titolo de la romano de Karol Piĉ "La Litomiĉla tombejo").

"Afekta marŝado" estas vera miskompreno, malĝusta traduko de "usiljeno marŝirango". Bone estus "rapidiga marŝo" kaj ankoraŭ pli bone "akcela" aŭ "akceliga", aŭ "akcelanta marŝo".

La esprimo "komunikilo" ripetiĝas plurfoje en senco "komuniko", "vojo", "ŝoseo", "trafikarterio", "komunikejo". Komuniko unuavice signifas ilon, rimedon, de telefonon, leteron, gazeton, radion, aŭtomobilon, aviadilon kaj eble apenaŭ lastvice ankaŭ vojon. La serbo-kroatan terminovorton "komunikacija" en ĉi tiu primitiva verko estus pli bone traduki: komuniko.

Por ke oni uzu la mallongigojn egalforme, estus bone anstataŭ JKJL (Jugoslavia Komunista Junulara Ligo) skribi IKJJ (Ligo de Komunista Junularo de Jugoslavio). Vidu "Leksikonon de sociolitika kaj memadministra terminologio", IKS, Zagreb.

En PLSPT - Popolliberiga Soldataro kaj Partizanaĵ Taĉmentoj de Jugoslavio kaj en PLSJ (PLS) - Popolliberiga Soldataro de Jugoslavio pli bone estus "Soldataro" ŝanĝi je "Armeo". Popolliberiga Armeo estas jam tre kutime uzata formo en Esperantujo. La esprimo "soldataro" ente-

nas ankaŭ iun negativan sencen, iun kromsignifon de io antipatis, malplaĉa kaj aĉa. Vidu en PIV sub 2.: trupoj, bando, hordo. "Soldataro" povas esti serbo-kroate tradukita: soldateska.

Rade Škalamera

Rijeka, la 7-an de junio 1988

11

31.05.1988.

jugoslavia stelo

Petar Mišković, LA ĈEVALSALTO. Aerinvado al Drvar en 1944. Epopeo kaj historiaj faktoj. Eldonis: ELBIH, Sarajevo, 1986. Paĝoj: 88. Broŝurita. Dek fotoj, tri skizoj. Dek kvar-paĝa ankonduko de la eldonisto sub la titolo: Kontribuo de Jugoslavio en la dua mondmilito. Tradukinto: Senad Ĉolić.

RECENZO

Kiel aventura romano

ELBIH eldonis jam serion da libroj el politika literaturo: du verkojn de Tito, tri verkojn pri Tito kaj du serbiajn studojn de Edvard Kardelj.

Ankaŭ „La ĉevalsalto“ apartenas iom al tiu serio, ĉar temas pri Tito, kvankam, aliflanke, oni povas ĉi tiun libron envidigi en la historian literaturon, aŭ pli ĝuste en la militliteraturon. La aŭtoro mem en mallonga antaŭvorto tre koncize kaj trafte konstatas: „Tio ĉi libro rakontas surbaze de aŭtentaj fontoj kaj dokumentoj pri unu el la plej glorsaj bataloj de la jugoslavia revolucio, pri heroo rezisto de batalantoj kaj popoloj en la bosnia urbo Drvar dum la subita germana aerinvado en 1944 kies ĉefa celo estis likvidi estraron de la popolliberiga movado kaj ĝian gvidanton, marŝalon Titon“.

Esperantuloj havas, do, ankaŭ unu okazon ĝui la rakonton pri la fama batalo en Drvar, kie Tito disbrakis atakon de Hitler kaj lian intencon senkapigi la Popolliberigan Armeon de Jugoslavio. Ĉifole la malpotenco de Hitler kapti Titon estas rakontita per tuta libro. Antaŭ 34 jaroj la evento estis priskribita nur kiel unu el inter multaj detaloj, sur kvar paĝoj, en la dika libro de Vladimir Dedjger pri biografio de Tito, en tre bona Esperanta traduko de Mason Sturtard.

Drvar fariĝis unika urbo en la tiel nomata „eŭropa fortikaĵo“ de Hitler. En Drvar estis la sidejo de la Supera Stabo de la Popolliberiga Armeo de Jugoslavio. Tie estis Tito. Tie estis militaj reprezentantoj de la aliancanaj armeoj, soveta delegacio kaj oficiroj de la angia kaj usona militistoj. Drvar estis la sola urbo en la okupita Eŭropo en kiu troviĝis militaj reprezentantoj de ŝtatoj de kontraŭhitleria koalicio. La milit-

operaco „ĉevalsalto“ estis unu el la plej esceptaj kaj plej delikataj entreprenajoj kiujn la germanaj militfortoj plenumis dum la periodo de la dua mondmilito. La estro de la Tria Regno Adolf Hitler mem estis iniciatinto de tiu operaco. Jam en la jaro 1943 la kapo de Tito estis ĉantaĝita je 100.000 oraj germanaj regnomarkoj.

Kiel en aventura romanoj oni zorgotreme travivas danĝerajn situaciojn timante pri la sorto de la ĉefa heroo, tiel legante „La ĉevalsalton“ oni ofte ekpensas ĉu sukcesos kaj ĉu sukcesos Tito eliri el teruraj okazoj, ĉu li eskapos al lastaj ĉasistoj al homo. Estis infero. La sola sukceso de la plej elita aerinvada germana batalgrupo „Fentoro“ estis la konflikto de la marŝala uniformo de Tito, en tajlorejo de la Supera Stabo.

La aŭtoro Petar Mišković interese skribis kaj Senad Ĉolić bone tradukis. Tamen kelkaj paĝoj estas tre ŝarĝitaj per nomoj kaj mallongigoj (propraĵaj nomoj, loknomoj, nomoj de politikaj, armaj kaj aŭtoritataj organizoj kaj instancoj). Eble en tiuspeca literaturo ĉi tio ŝajnas preskaŭ neevitebla, sed tio tamen ĝenas.

Propraĵaj nomoj de iuj konataj personoj estas (neglekte aŭ pretervide) malĝuste skribitaj (Churchil anstataŭ Churchill, Fitzoi Mac Lean anstataŭ Fitzroy MacLean, Sreten Juljević anstataŭ Sreten Zujović, Meteor anstataŭ Meteorit). Nekonsekvence estas skribitaj aliaj nomoj: loknomo Banja Luka ripetigas multfoje en tri diversaj formoj. Oni ne skribas „firer“ sed nur „Führer“, ne „reselsprung“, sed nur „Rösselsprung“. Kontraŭe al tio, oni skribas nur „Abver“ kaj nenie „Abwehr“. Se la nomo estas von Varnbuehler, oni devas ĝin legi von Varnbuehler

kaj ne von Farnbuehler.

La nomojn de brigadoj kaj divizioj el regiono Lika oni skribis Dua lika brigado, ktp.

Ankoraŭ unu nekongvena esprimuzo: batalo („akraj bataloj“, „gravaj bataloj“, „post fortegaj bataloj“, „dramecaj noktaj bataloj“). En tiuj tiuj kazoj la vorto batalo estas maltaŭga, asocias al io infaneca, neserioza. Ĝi povas esti ŝanĝita per lukso aŭ per paŝado, fusilpaŝado, interpaŝado, kunpuŝigo, interpuŝigo, kolizio...

La esprimo „komunikilo“ ripetigas plurfoje en senco „komuniko“, „vojo“, „ŝoseo“, „tralikartorio“, „komunikejo“. Komunikilo unusolve signifas ilon, rimedon, da telefonon, leteron, gazeton, radion, aŭtomobilon, aviadilon kaj eble apenaŭ lastvice ankaŭ vojon. La serbo-kroatan terminovorton „komunikacija“ en ĉi tiu primitiva verko estus pli bone traduki „komunike“.

En PLSPT — Popolliberiga Soldataro kaj Partizanaj Taĉmentoj de Jugoslavio, kaj en PLSJ (PLS) — Popolliberiga Soldataro de Jugoslavio pli bone estus „Soldataro“ ŝanĝi je „Armeo“. POPOLLIBERIGA ARMEO estas jam tre kutime uzata formo en Esperantujo. La esprimo „soldataro“ antenas ankaŭ iun negativan sencen.

„La ĉevalsalto“ entute ne estas legiĝo peza, tre faka, militistara studaĵo por malvasta rondo de fakuloj. Ĝi ne estas tinda „ospediga unuflanka propagandilo“, sed honeste skribita raporto pri historiaj faktoj, pri unu eksterordinara evento elinter la multaj ekzemploj de kvarjara batalo por nacia libereco kaj sendependeco.

Rade Škalamera

Univerzalni pojmovi na esperantu, engleskom i hrvatsko-srpskom

LAPIDARNOST-REDUNDANTNOST, VOKALNOST-KONSONANTNOST I RIMIČNOST
UZORKA UNIVERZALNIH POJMOVA NA ESPERANTU, ENGLISKOM I HRVATSKO-
-SRPSKOM

Dr Josip Golčič, Dom zdravlja - Rijeka

SAŽETAK: Materinji jezik je jedno od 3.000 različitih sredstava sporazumijevanja, na koje spontano prevodimo većinu svojih misli i osjećaja, da bi ih saopćili onima koji to sredstvo razumju (1). Kada bismo mogli misli direktno čitati (2), nebi ih trebalo prevoditi na 3.000 jezika jer su misli zajedničke za sve ljude. Engleski sve više postaje, a esperanto je točno pred 100 god.stvo- ren nebi li postao svjetski jezik. Varijable u naslovu se lako objektivno mjere, relevantne su za komuniciranje i mogu biti prilog komparativnom vrednovanju različitih jezika. Na uzorku od 73 univerzalna pojma-sinonima u engleskom, esperantu i hrvatsko- -srpskom, analizirane su sve tri varijable. Esperanto je pokazao najbolje kriterijske rezultate, pa bi ga i zato, a ne samo stoga što je nacionalno ničiji i svačiji, trebali, uz svoj materinji, svi narodi svijeta prihvatiti i dalje razvijati, kao drugi-svjetski jezik i most međunarodnog sporazumijevanja.

MOTO: Sa malo riječi mnogo reći; riječima tijesno mislim široko.

UVOD: Vrijediš koliko stranih jezika govoriš. To je nažalost istina, srećom samo djelomična. U jezičnom Babilonu poliglota se stvarno bolje sporazumijevaju. Ali, svi se ti jezici baziraju na istim općeljudskim pojmovima, mislima i osjećajima, koje samo izražavaju i prevode na tolike različite riječi. Stoga je spoznajno vrednije stvarati ili usvajati nove pojmove, nego li ih znati prevoditi na razne rječnike-verbalne kopije. Ljudska se kreativnost rasipala u stvaranju obilja riječi-sinonima, umjesto da stvara nove pojmove i za njih samo po jednu, ali vrijednu riječ, precizan termin. Da su svi ljudi oduvijek govorili samo jednim jezikom, taj bi sedes očito bio pojmovno bogatiji od svih postojećih i neopterećen tolikim balastom "indigo rječnika". Nakon su- ludih militarističkih troškova, danas su pri vrhu besmislenosti oni za prevođenje se jezika na jezik. Iza drugog svj.rata engle-

ski se uz suport najvećeg kapitala nametnuo kao vodeći, pa malim narodima i jezicima prijeti lingvistički imperijalizam-kolonijalizam od velikih jezika, koji nemaju čak ni Vukovo causa brevis, genijalno pravilo ekonomičnosti. U sjeni velikih jezika već 100 g. širi se i razvija esperanto, koji je i stvoren da bi bio najlakši i najizražajniji jezik, kako bi se konačno i proleter i svih zemalja svijeta mogli najprije razumjeti, a onda i ujediniti; bez prvoga je drugo utopijska fraza i politička floskula. Sa etičkog i sa spoznajnog aspekta ljudskom rodu treba odevno jedan zajednički jezik, svačiji a nacionalno ničiji, bez čega je nemoguće besklasno društvo, definitivno razoružanje i konačni svjetski mir, samoupravljanje i drugi futurološki ideali.

PROBLEM: Komparativno analizirati 3 varijable u 3 jezika na uzorku univerzalnih pojmova, kao prilog vrednovanju njihove komunikativnosti.

NUL HIPOTEZA: Ta se tri živa jezika ne razlikuju međusobno u tri varijable na uzorku univerzalnih pojmova.

METODA: Za engleski i esperanto sam se, uz hrvatski, odlučio zato što prvi postaje, a drugi je trebao, ili bi trebao postati, svjetski jezik. Lapidarnost-redundantnost je mjerena ukupnim brojem svih slova i važna je za ekonomičnost, pogotovo pisanog komuniciranja. Vokalnost-konsonantnost je mjerena i ukupnim brojem vokala i onih na posljednjem slovnom mjestu, jer njihov omjer daje ljepotu i melodioznost govoru, po čemu je naš jezik pri vrhu svjetskih jezika, odmah iza talijanskog(3). Rimičnost je mjerena ukupnim brojem rime tj. identičnim barem završnim slogom, po čemu je naš jezik, navodno, vrlo siromašan(4). Kako ne postoji konačna, općeprihvaćena lista univerzalnih, općeljudskih pojmova, a za takav sam se jezični uzorak odlučio, počeo sam od elementarnih potreba i aktivnosti zajedničkih svim ljudima, od njihovih osobina i prirodne okoline i našao ovih 40 imenica, 27 glagola i 6 pridjeva ili ukupno 73 univerzalna pojma bez pretenzije da popis bude konačan; svatko može dodati ili izbaciti svaki novi relevantni pojam : sunce, nebo, svjetlo, zrak, voda, vatra, vrijeme, prostor, dan, noć, zvuk, toplina, ime, istina, sloboda, mir, rat, novac, čovjek, muškarac, suprug, dijete, otac, sin, brat, prijatelj, tijelo, glava, oko, uho, usta, srce, ruka, noga, kruh, mlijeko, životinja, ptica, riba i biljka(40) živjeti, umrijeti, disati, piti, jesti, raditi, spavati, ležati, učiti, misliti, govoriti, odgovoriti, pitati, gledati, vidjeti, slušati, čuti, stajati, hodati, trčati, plivati, skočiti, sjediti, ljubiti, kupiti, prodati, platiti(27) mlad, zdrav, dobar, lijep, sretan, gladan(6),

REZULTATI I DISKUSIJA: 40 imenica, 27 glagola i 6 pridjeva ili 73 pojma, puta 3 jezika je 219 pojmova koji se kao vrste riječi nisu

statistički značajno razlikovale ni u lapidarnosti, ni vokalnosti, ni rimičnosti, jer su se nađene razlike uglavnom poništavale. Jedino su pridjevi značajno zastajali za glagolima i imenicama u rimičnosti, ali ni to nije relevantno zbog malog broja pridjeva u uzorku. Stoga u tablicama 1.-4. prikazujemo samo kako prolaze naša 3 jezika u svih 219 pojmova u broju svih slova, u broju svih vokala i i konsonanata, u broju svih završnih vokala i u broju svih rima. Tablica 1. i 2. nemaju razlike statistički značajne na $P 0,05$ ($X^2 = 3,319$ i $X^2 = 1,516$). Tablice 3. i 4. imaju razlike statistički značajne na $P 0,01$ i $P 0,05$ ($X^2 = 29,889$ i $X^2 = 9,119$). Vidimo da je esperanto u svim varijablama najbolje prošao, jer ima najkraću prosječnu riječ od 4,8 slova, ima i najbolji omjer vokala-konsonanata od 47,4 - 52,5 %. U završnoj vokalnosti je superioran sa 20,6%, kao i u rimičnosti sa 78,1%. Rezultati dakle odlaćuju nul-hipotesu, pa se može reći da ove varijable razlikuju ove jezike u uzorku razmotrenih univerzalnih pojmova. Vrijedilo bi rezultate provjeriti i na nekom drugom uzorku, recimo od 100 najčešćih riječi govornog i pisanog jezika.

Tablica 1. broj svih slova:

1. esp.	354	M=4,8
2. eng.	377	M=5,2
3. hrv.	405	M=5,5

Tablica 2. broj svih vokala-konsonanata:

1. esp.	168 - 47,4 % vok.	186 - 52,5 % kons.
2. hrv.	172 - 42,5 % vok.	233 - 57,5 % kons.
3. eng.	148 - 39,2 % vok.	229 - 60,7 % kons.

Tablica 3. broj svih završnih vokala:

1. esp.	73 - 20,6 %
2. hrv.	51 - 12,6 %
3. eng.	19 - 5 %

Tablica 4. broj svih rima:

1. esp.	57 - 78,1 %
2. hrv.	31 - 42,5 %
3. eng.	22 - 30,1 %

ZAKLJUČAK: Na uzorku od 73 univerzalna pojma esperanto je imao najbolje rezultate, bolje od engleskog i od hrvatskog u lapidarnosti, vokalnosti i u rimičnosti, iako je star tek sto godina i premda je na njemu do sada stvaralo najmanje ljudi. Kako je on otvoren za naj-

vrednije lingvističke pronalaski i novine svih jezika svijeta, možemo se nadati da će njegove izražajne mogućnosti i dalje rasti, brže od svakog pojedinog nacionalnog jezika, koji je već imao višestoljetnu šansu za razvoj.

LITERATURA:

1. Golčić, J. Psiholingvističke razlike u sadržaju, rječniku i rimariju između pjesama za djecu i dječjih pjesama, Disert. Fil. fak. Zgb. 83.
2. Rasil, B. Osvajanje sreće, Minerva, Subotica 1982. III izd.
3. Babić, Š. U čemu je ljepota hrvatskog jezika? Jezik, 4. Zgb, 1963.
4. Kaštelan, J. Lirika A. G. Matoš (i naš prvi rimarij) Rad JAZU, 310. Zgb. 1957.

Rijeka, juna 1987.

Doc. Dr. Josip Golčić
psiholog

Josip Golčić

Ni konatiĝu kun germana profesoro Rikardo Ŝulco

Mariensht. 38
Rikardo Ŝulco, D-4958 MINDEN
libro de la lingvo de la Kroataj

1988-04-14

Kara Brjo Ĥević,
mi ĵus estas elleginta la romanon de Miroslav Kaleja "Rando de l' pudento". Literatura grandiosa verko! Mi multe ĵuas la legadon. La lingvaĵo bone estas sen manĝbaro. Ĝi estas multe malpli ol tiu de la Moderna Kroata Prozo de 1970.

Ĝiaj bonaj salutoj

... ..



Rikardo Ŝulco, germana profesoro pri romanaj lingvoj, estas konata en Esperanta literaturo kiel originala verkisto kaj tradukisto. Esperanton li lernis en 1932 j., sed pro malfavoraj politikaj cirkonstancoj en Germanio ne okupiĝis pri ĝi. Post la milito, li konvinkiĝis, ke ankoraŭ ekzistas la Zamenhofa Internacia lingvo kaj pro ĝia graveco li rezignis pri ĉiuj aliaj aktivecoj kaj ekde 1974 li nur poresperante laboris. Pri tio pravas speciale liaj du verkoj en germana lingvo: MEIN GELIEBTES ESPERANTO kaj EUROPÄISCHE HOCHSPRACHE ODER SPRACHIMPERIALISMUS?

Precipe legindaj estas liaj germanlingvaj libroj: DAS WUNDERSAME LEBEN DES ARMEN DR. LAZARUS kaj WAS ESPERANTO BETRIFFT.

En la Esperanto literaturo li fariĝis konata pro siaj diversaj tradukaĵoj, ni menciuj nur: La PERDITA HONORO DE IU KATARINO BLUM de la nobelulo Heinrich Büll, ankaŭ per siaj originalaj poeziaĵoj.

En 1985 j. Ŝulco aperigis en Esperanto la verkon: PLEDO POR UNUECA LINGVO. Ĝi estas konsiderinda kontribuo por Esperantologio. En tiu ĉi verko li prezentas ideojn kaj kritikejn pri logika uzado de la Lingvo.

Omaĝe al Zamenhof en la centjariĝo de Esperanto aperis lia verko (1988) SUR LA VOJO DE LA ANALIZA SKOLO dediĉita unualoke al la memoro de Ludoviko Mimoo Espinalto, inicianto de la Analiza Skolo, ankaŭ al la Esperantistaj verkistoj, redaktistoj kaj aliaj aŭtoroj.

En la jaro 1985 Rikardo Ŝulco estas akceptita kiel "adjunktodocento" en la Internacian Akademion de la sciencoj en San Marino, kaj 1986 la Germana Esperanto Ligo akceptis lin kiel sian honoran membron.

La libron BANDE DE L' PRUDENTO, esperantigita romano de Miroslav Krleža, li mallonge recenzis jene: "Literature grandioza verko. La lingvaĵo tamen estas iom mankhava, kvankam multe malpli ol tiu de la "Moderna kroata prozo".

Anja Hurčak



80 JAROJ

1907 1987 DE ORGANIZITA
E ESPERANTO
MONDO EN
RIJEKA

30. 10. 1987.
51101
RIJEKA